

エスペラントは心の国境を消すことばです

Organo de Hokkajda Esperanto-Ligo

Heroldo de HEL

N-ro 155


Septembro 2014

HOKKAJDA ESPERANTO-LIGO

北海道エスペラント連盟

[Enhavo/目次]

- ・表紙、Enhavo/目次 P. 1
- ・ Ni partoprenu en la 78-a Hokkajda Kongreso de Esperanto! / 第78回北海道E大会のご案内
/ KAWAI Yuka / 川合由香 (事務局長) P. 2
- ・ HEL partoprenis en la Elpla-Festivalo / YOKOYAMA P. 3
- ・ RAPORTO pri E.-movado en Asahikawa / 旭川市
博物館でエスペラントについての講演
/ HOS^IDA Acus^i P. 4
- ・ "Sekura socio" plena de "suspektindaj homoj"
/ 「不審者」だらけの「安全な」社会 / KAWAI Y P. 5
- ・ Antaŭparolo por LA HISTORIA --- / ロシア極東E運動
小史紹介 / HOS^IDA Acus^i P. 7
- ・ LA HISTORIA PAG^O DE ESPERANTO-MOVADO
EN LA FORA ORIENTO / Aleksandr Titajev
・ Danke ricevitaj (星田淳扱い) P. 11
- ・ Lingvaj babiladoj P. 12
- ・ Protokolo de la 6-a Komitato Kunsido ... /
2014年度第6回HEL委員会議事録 P. 13
- ・ [編集後記 / Redaktanto parolas] P. 14



Ni partoprenu en la 78-a

Hokkajda Kongreso de

ESPERANTO!

第 78 回北海道エスペラント大会のご案内

KAWAI Yuka (Sekretario de HEL)

川合由香 (事務局長)

今年の北海道 E 大会には、日本 E 大会 (福井県小浜市) に国外からの gasto と
して参加の、Kim Seon-Wook (E 名 : Suno) さん (韓国) をお招きします。1989
年 (平成元年) 生まれ。お若い! (^_^) 「韓流」などの現代韓国文化から若者の
E 運動の現況まで、「何でも」(←"Io ajn bonas por mi."とご本人はおっしゃって
います) 皆様とお話したい、とのこと。

委員会ではこの Suno さんの番組は公開とすることにし、HEL-ano 以外の道内
E-isto (若手も) や一般の方への参加も呼びかけております。

肩のこらない自由な談話会になりそうです。ふるってご参加ください。

10月18日(土)・19日(日)は「かでの 2.7」〜Ni venu!

大会プログラムはこの「Heroldo de HEL」に同封の「連盟総会議案書」をご参照
願います。

★Pri s-ro Suno★

1989 年生まれの 25 歳。フランス語・フランス文学専攻の大学院生。目下、ヴィク
トル=ユーゴーの小説をテーマに修士論文執筆中とのこと。E について知ったのは
中学生のとき。「中立につくられた言語」ということに興味を持ち、独習を始めたも
の、相関詞につまづいてそのときはいったん挫折。2012 年、自分の在学する大学
で E の授業があると知り、迷わず受講! その年末、(再) 学習開始後わずか 4 ヶ月
で、日本で開催された la 31-a Komuna Seminario に参加し、日本に友人を多数つ
くる。その後、JEI や大本の招待で、講演や E の指導のために何度か日本を訪れ、
「名誉なことでもあり、喜びでもあり」(本人談) …今回の北海道訪問も大いに楽
しみにしておられるようです。

HEL partoprenis en la Elpla-Festivalo 2014.

Raportas YOKOYAMA Hiroyuki

今年は9月6日(土)に札幌エルプラザにてエルプラまつりを行いました。



場所は3階和室で、日程は以下のとおり。

8:45～ 出展準備

9:45～ オープニング、3階ホール

10:00～16:00 エルプラまつり 2014

16:00～16:30 エンディング、3階ホール

16:30 後片付け

和室で、じっくりとエスペラントの説明ができてよかったです。

今年は、エスペラントの図書の展示とエスペラント入門のポスターを5枚貼り興味を持ってくれた人にはエスペラントの簡単な説明をしたり、簡単な教本をお渡ししました。

ビラ配布数は500枚。エスペラントグッズのくじをセットにしてビラを配ったところ、入場してくれる人が多くなり、人寄せ効果があったと思われます。また、お祭り自体の方のスタンプラリーにも参加したので、その分の入場者も多くなりました。人を呼び込む工夫は今後とも続けていくとよいと思います。今年は、154名の入場がありました。例年と比べても多い方と思います。

参加された HEL-anoj(敬称略)は

横山、川合、阿部、後藤(義)、後藤(純)、白濱、柳、大友、山下、金森(10名)でした。

その他、初夏講習にもお越しいただいた大野さんにもご参加いただきました。

Koran dankon por via granda kun laboro!

みなさんお疲れ様でした。

訪問者と一緒にエスペラントの歌を歌ったり、カナダ・ケベック州から来たジェリナ・ヴェンサンさんはエスペラントに興味を持ってきて、説明をして説明書を渡しました。後ほど、お礼のメールが来ました。今は日本語を勉強しているが、帰国したらケベックのエスペラントの組織に参加したいとのことでした。

それからハワイ語も学習している女性がエスペラントにも興味をもってきて、当連盟のものも含めたエスペラントのホームページを見て学習をするかどうかを決めたいと言ってくれました。1人だと続かないので団体に学習したいとも言っていました。

来る11月23日(日)には、エルプラまつりと同じく札幌市市民活動サポートセンター主催で、10:30~15:30に札幌駅前通地下歩行空間(北大通交差点広場(西))で「ミニシアター」というイベントが行われます。

10分程度のビデオを流して団体の紹介をしたり、活動内容を展示したポスターの前で説明したり広報活動を行います。当連盟も参加する予定となっていますので、またご協力をお願いいたします。

RAPORTO pri E.-movado en Asahikawa
旭川市博物館でエスペラントについての講演

HOS^IDA Acus^i

La 14-an de septembro oni raportis pri Esperanto en Asahikawa.

9月14日 旭川市博物館の岡本達哉学芸員が 旭川でのかつてのエスペラント(E)運動について話しました。内容は

Eの概略説明、博物館にあるEの古書、戦前の旭川でのE講習会の記事、旭川東高のE部 等で関連の資料コピーが配布されました。

北海道新聞9月13日朝刊に予告記事が出ました。旭川市博物館には天方良彦さんが エスペラントのチラシなどをちよいちよい持っていき、岡本達哉学芸員に説明しているとのことでした。

“Sekura socio” plena de “suspektindaj homoj”

「不審者」だらけの「安全な」社会

KAWAI Yuka

川合由香

夜道でひとり泣く子は放置するのが正解？ 警察から送られてくる「不審者情報メール」はどこまで適切か？ 不審者扱いをおそれて、ちょっとした親切を行うことにさえためらってしまう現代の大人たち。「ひとを見たら不審者と思え」、そんな社会にはしたくないけれど…。

Mi havas filon en la 6-a lernojaro de elementa lernejo. Kiam li eniris en la lernejon, mi registrigis mian retadreson al la loka polico laŭ ĝia rekomendo. Por kio? – por ricevi averto-mesaĝojn pri “suspektindaj homoj”, kiuj malbonintence alproksimiĝas al lernantoj.

Iun tagon en januaro 2014, sur interreto vekis ardan diskuton unu artikolo sur socia retejo *Twitter* de iu viro. Li rakontis jene. Sur vespera vojo li trovis 7-8jaraĝan knabinon piedirantan sola kaj ploranta . Li komence intencis helpi ŝin, sed rezignis tion. Li timis, ke liaj alproksimiĝo kaj alparolo al la knabino estos rigarditaj kiel suspektindaj agoj. Anstataŭe li telefonis al polico. La policano petis lin akompani ŝin ĝis la plej proksima policejo. Sed li rifuzis tion, dirante, ke iu policano tuj venu surloken, kaj foriris. Li antaŭtimis mis-arestadon.

Ĉu lia ago estis justa? Ĉu lia antaŭtimo estis trafa? Aŭ ne? Mi supozas, ke hodiaŭaj japanoj 40kelkjaraĝaj kaj pli junaj povas kompreni lian heziton. Ankaŭ mi ne facile nomas lian agon troa memdefendo.

Mi mem ricevas el polico averto-mesaĝon en ĉiu 2-a aŭ 3-a tago. La mesaĝoj ĉefe temas pri “suspektinda alparolo”. Inter ili fakte troviĝas raportoj pri homoj danĝeraj al lernantoj. De tempo al tempo tamen troviĝas okazoj en kiuj estas dubinde , ĉu la raportita persono vere estis preta je krimo.


Surrete troviĝas eĉ jenaj ekzemploj kaj similaj, kiuj ŝajnas esti tute ne problemaj : “Viro demandis al lernanto, kie estas la stacio.” “Viro salutis lernantojn, kaj ridaĉis”.

Se ni konsideras, kion polico kaj lernejoj instruas al lernantoj, ni devas konkludi, ke hodiaŭ vira plenaĝulo preskaŭ ne povas eĉ demandi geknabojn pri

vojo sen risko de miskompreno. Polico kaj lernejoj instruas al lernantoj, ke ili ne bezonas respondi al demando, se la alparolanto estas nekonata. Kiam mi estis elementa lerneĵano, polico kaj lernejo simple admonis nin ke ni ne akompanu nekonaton. Kiam iu nekonato demandis min pri vojo, mi bonvole respondis al la demando ... eble tio estas rakonto.

Mi povas kompreni la fonon de la elekto de la viro supre menciita. Mi tamen kuraĝas diri, ke alproksimiĝi, alparoli kaj helpi infanon estas devo de plenaĝuloj, malgraŭ ebleco de miskompreno. La infano estas malpli forta estaĵo ol la plenaĝulo. Se diri pri la ĉi-supra kazo, la knabino estis elmetita al plia danĝero de “vere suspektindaj homoj” post la foriro de la viro ĝis la alveno de policano. Mi bedaŭras, ke li ne rekte helpis ŝin.

Samtempe mi deziras, ke polico ne elsendu averto-mesaĝojn tiel facile. Se la infanoj senĉese ricevas avertojn bazitajn sur malfido al aliaj, kiel aspektas la socio en liaj okuloj? Jam la tempo venis, kiam ni, plenaĝuloj, devas pensi serioze, kiel fari la socion, en kiu ni ne plu bezonas la frapfrazon: “Ne fidu nekonaton.”



(el iu reta enketo en januaro 2014)

(「La Movado」 2014 年 4 月号より転載 (一部改変))

Antaŭparolo por

LA HISTORIA PAGĜO DE ESPERANTO –
MOVADO EN LA FORA ORIENTO

ロシア極東エスペラント運動小史(A. Titajev)紹介

HOSĜIDA Acusĝi

6月の合宿で Julio Baghy の La Verda Koro を読みました。舞台になっているロシア極東・ウラジオストクは一世紀前二葉亭四迷が訪れてエスペラントを日本に持ち帰った因縁の土地です。1887年エスペラントが発表されたワルシャワは当時ロシア帝国に属していましたからエスペラントはまずロシア国内に広まり1891年ウラジオストクにできた会はアジアで最初のエスペラント会でした。

それ以来1世紀にわたるロシア極東のエスペラント運動についての小論文が2003年のアジア太平洋青年研究者フォーラムの論文集に出ているので、以下に紹介します。筆者は2年前の日本大会(札幌)に参加予定だったが病死して果たせなかった、ウラジオストク工業大学の講師 S-ro Aleksandr Titajev です。彼は1998年の第62回北海道大会(苫小牧)に出席したことがありました。

この論文に出てくる人の名前を見ると：

二葉亭四迷に日本語のエスペラント教科書を出せとすすめた F.A. Postnikov, トルストイの秘書だった Viktor Lebren, La Verda Koro に出ている Ronaldo Vonago, Julio Baghy 等があり、Oomoto や HEL の訪問団についても触れています。お読みください。

LA HISTORIAJ PAĜOJ DE ESPERANTO – MOVADO EN LA FORA
ORIENTO

Aleksandr B. Titajev
For Orienta Ŝtata Teknika Universitato
Vladivostok, Rusio

Ankoraŭ antaŭnelonge oni ne sciis, kiu
estis la unua organizanto de Esperanto –

movado en Fora Oriento de Rusio. Estis
sciata nur la jaro – 1891, kiam estis fondita la

unua Esperanto – societo. Laŭ la «Historieto de Esperanto de A. Fiŝer» tiu societo estis la unua ne nur en Fora Oriento, sed ankaŭ en Azio [1].

La persono, lanĉinta la unuajn kursojn de Esperanto en Vladivostok kaj Kamenj – Ribolov, estis Fjodor A. Postnikov, kiu post la fino de la milita lernejo en St.-Peterburgo komencis militservi en la Ussurijska Kozaká armeo. Antaŭ la forveturo al Fora Oriento li konatiĝis kun Ludovik Zamenhof, iniciinto de Esperanto, kaj ties lingvo, kiun li ne lasis la tutan vivon. Inter la unuaj membroj de la societo estis Viktor Lebrén, la estonta secretario de Leo Tolstoj. Dank'al tiu societo jam en 1892 pri Esperanto eksciis loĝantoj de Manĉurio.

La societo ekzistis nelonge kaj nur en Oktobro, 1901 Fedor Postnikov post reveno el Peterburgo, kie li lernis en la militingeneria Akademio kaj la avaiadlernejo, sukcesis oficiale refondi la Esperanto – societon. La refondita societo iĝis la filio de la Peterburga societo «Espero», kiun Postnikov ĉefis dum 2 jaroj ĝis alveno al Vladivostok (1897 – 1899) La filio konstistis el 28 personoj; inter kiuj estis multaj membroj al la Societo de Esploro de Amura Regiono (OIAK) N.M. Solovjov, V.Ju. Petrovskij; F.L. Vilĉinskij, N.A. Palĉevskij, N.V. Kirilov k.a [2].

En Ĥabarovsko la loka filio de la Peterburga societo estis fondita en 1902 de S.F. Poljanskij.

Gvidante la Vladivostokan filion dum 5 jaroj Fjodor Postnikov klopodis disvastigi Esperanton pere de la fama japana verkisto Ftatabej Ŝimej (Hasegawa), kiu lernis Esperanton ĉe Postnikov kaj poste publikigis la unuan Esperanto – lernolibron por japanoj.

La domo de Postnikov en Vladivostoko situis sub monto en estinta strato Lazarevskaja (nun ĉi-tiu iome rekonstruita domo sub numero 99 situas sur la strato Puŝkinskaja) Dum 6 jaroj la domo estis ankaŭ la loko de socia agado de Postnikov. Sur ĝia ekstera okcidenta flanko estis desegnita granda verda stelo sur blanka fono kiel simbolo de Esperanto.

Dum la Rusi – Japania milito (1904 - 1905) Fjodor Postnikov kiel la unua

Komandanto de aernaviga parko projektis kaj konstruis la sferan aerostaton. Al ĝi oni donis nomon «Espero». En tiu – ĉi tempo F. Postnikov kiel prezidanto de la loka Esperanto – societo aranĝis la koncert – balon kies profitmonon uzis por plibonigo de financa stato de psikiatria hospitalo de la urbo Nikolsk – Ussurijsk. Post la fino de la milito la subkolonelo Postnikov pro la politikaj kaŭzoj rifuzis de la milita servo, vendis la tutan sian havaĵon kaj forveturis al Usono, kie li tre aktivis en multaj sferoj, inkluzive de Esperanto.

Post la forveturo de F. Postnikov la societon gvidis la alia eminenta persono Vladimir Konstantinoviĉ Neupokojev, la estro de la Vladivostoka Mara Lernejo, en kiu Esperanto estis enigita de li kiel deviga studobjekto. En la lernejo ne estis portreto de la tiama rusa caro Nikolao II kaj anstataŭ ĝi pendis portreto de la Esperanto – kreinto d – ro L. Zamenhof. Sub la gvido de Neupokojev estis malfermitaj Esperanto – kursoj ĉe Popola Domo, Orienta Instituto, Vira gimnazio, Marista hospitalo, marhaveno [3].

En 1910 la societo iĝis memstara kaj ricevis propran ejon en Popola Domo. En Puŝkina teatro la societo aranĝis diversajn Esperanto- festojn. Precipe ofte inter gastoj oni povis ekvidi la kunfondinton kaj prezidanton de Manĉuria Esperanto – societo Nikolaj A. Kazi – Girej, eminenta civila inĝeniero de Ĉina Orienta fervojo, kiu en 1896 kaj 1912 tradukis 2 rakontojn de rusa verkisto Vsevolod M. Garŝin. En 1902 li publikigis en 7 eŭropaj lingvoj kaj Esperanto leteron por Esperanto, adresita al Geografia Societo en Antwerpen [4].

Pri la agado de Esperanto – societo verkis ne nur lokaj ĵurnaloj, sed ankaŭ Esperanto-gazetaro en Centra Rusio kaj eksterlande.

Post morto de V. Neupokojev (1912) la Vladivostokan societon «Espero» gvidis Aleksandr D. Pagirev, kiu ĝis tiu tempo gvidis Esperanto-societon en Kamenj – Ribolov. Li donacis al la Vladivostoka societo pli ol 150 Esperanto -librojn.

En la jaro 1914 la societon jam gvidis notario Ronald Vonago, ĉar A. Pagirev estis devigita ŝanĝi oficekon. Ronald Vonago estris la societon ĝis la fino 1922. Dum tiuj

templimoj la societon vizitis multaj landaj kaj eksterlandaj gastoj el Japanio, Ĉinio.

Dum la jaroj 1918 - 1920. la estonta fama verkisto Julio Baghy gvidis E - kursojn en la urboj Nikolsk - Ussurijskij kaj Vladivostok. Poste pri tiuj eventoj li verkis la facilan romaneton por esperanto-komencantoj «La verda koro».

La alia verkisto Vasilij Eroŝenko malgraŭ sia blindeco multe vojaĝis tra la mondo helpe de Esperanto. Vladivostokon li vizitis kelkfoje, en 1914, 1921, 1929, 1930, traveturinte al kaj el Japanio kaj Ĉuĉotko. Bonege posedante japanan lingvon V. Eroŝenko verkis en tiu lingvo multajn rakontojn kaj famiĝis inter la progresema japana literaturistaro.

En 1922 li prelegis lekcionojn pri rusa literaturo kaj aliaj temoj en Pekina universitato kaj edukista kolegio por virinoj.

En Fora Oriento komencis sian agadon ankaŭ alia fama esperantisto (ekde 1910) Innokentij Serišev, ortodoksa pastro kaj pedagogo. Havante 200 korespondantojn el 80 landoj, li sukcese vojaĝis tra la mondo, inkluzive Japanion, Ĉinion kaj Aŭstralion.

En 1922 li laboris en Manĉurio (Harbin) publikigis siajn verkojn en la "Geroldo de Azio". En 1924 li fondis en Harbin Esperanto - eldonejon "Oriento", kie estis presita en julio 1925 la ĵurnalo sub la sama titolo. En 1924 Seriŝev instruis Esperanton en Pekina Esperanto - lernejo. La 13 - an de Decembro, 1924 okaze de la naskiĝtago de L. Zamenhof li elpaŝis kun granda raporto pri la kunlabaro de Okcidento kaj Oriento.

En 1928 Seriŝev forveturis tra Japanio al Aŭstralio, kie dank' al lokaj esperantistoj li trovis konvenan laboron

Lia fratino Varvara estis aŭtoro de la rimarkinda porinfana Esperanto lernilo "Verda steleto" (1928) [5].

Esperanton oni disvastigis ne nur en la grandaj urboj kiel Vladivostok, Ĥabarovsk kaj Blagoveŝĉensk, sed ankaŭ en Ĉita, Ussurijsk, Ŝkotovo, Ĉernigovka, Ŝimanovsk, Nikolaevsk sur Amur, Zavitaja k. a.

Dum la revoluciaj jaroj (1917 - 1922) kaj poste Esperanton uzis kiel rimedon por monda proletara internacumotivaj famaj revoluciuloj kiel Vsevolod Sibircev, Konstantin Suhanov, Jakov Kokuŝkin, Nikolaj Matveev (Bodrij). La ĵurnaloj "Krasnoje Znamja" (Ruĝa standardo) kaj "Juna komunisto" aperigis artikolojn pri novaj Esperanto - kursoj por laboristoj kaj lernejoj, pri uzado de Esperanto en internacia edukado de Junularo. En 1932 en Ĥabarovsk estis fondita For-Orienta Sekretariato de Internacio de proletaj esperantistoj kun la partopreno de esperantistoj de USSR, Japanio, Ĉinio kaj aliaj landoj.

Kiel jam estas sciata, en la jaroj 1937 - 1938 la gvidantoj de Sovetia Esperantista unio estis arestitaj kaj Esperanto - movado en la lando disfalis.

Multaj Esperantistoj, trafinte en la koncentrejojn, uzis Esperanton kiel sekretan lingvon kaj savis unu la alian laŭ ebleco.

Nur post la dua mondmilito kaj precipe okaze de la Tutmonda festivalo de Junularo kaj studentoj en Moskvo (1957) Esperanto-movado en Sovetunio poŝtome komencis kreski. Ekzemple, en Blagoveŝĉensk en 1958 estis eldonita la lernolibro de A. Kerner "Esperanto en 12 lecionoj". En Fora Oriento elpaŝis kun lekcionoj pri Esperanto lektoroj de la societo "Scio". Estis rerajtigataj liberigitaj iomaj esperantistoj. Poste entuziastoj de esperanto lanĉis esperanto - kursojn kaj fondis klubojn kaj societojn en Petropavlovsk - Kamĉatskij (1975), Vladivostok (1980), Magadan, Ĥabarovsk (1981), Aldan (1990).

La komuna Esperanto - organizo en Fora Oriento de Rusio tiam ne ekzistis, pro tio la kluboj agadis memstare. Ekzemple, en 1984 Vladivostokaj esperantistoj enkadre de Scienca Studenta konferenco ĉe la Supera Mar - Naviga lernejo aranĝis la sekcion "Interlingvistiko kaj Internacia Edukado", kiun partoprenis esperantistoj el Tomsk, Kujbiŝev kaj Krasnojarsk. En 1985 Vladivostokaj esperantistoj organizis la Internacian ekspozicion de Infana desegnaĵo.

En 1990 okazis du regionaj Esperanto - renkontiĝoj - maje en Vladivostoko kaj novembro en Ĥabarovsk, kie oni decidis fondi la Asocion de For-orientaj

esperantistoj. Poste estis lanĉita la koncerna bulteno "Kuriero", kiu estis eldonata ĝis 1992.

Estis aranĝitaj post longa interrompo ankaŭ eksterlandaj renkontiĝoj: 1990, vizito de "Oomoto" – karavano al Ĥabarovsk, Naĥodko kaj Vladivostok; 1992 – Internacia Simpozio "Pacifiko" Lingvo. Kulturo. Kunlaboro, (Vladivostok) kun partopreno de Esperantistoj el Japanio, Ĉinio kaj Koreio. Inter rusianoj estis gastoj el Moskvo, Magadano, Petropavlovsk - Kamĉatskij, Komsomolsk ĉe muro, Aldan kaj Vladivostok [6].

Ekde 1990 vigliĝis ligoj inter japanaj kaj for – orientaj esperantistoj. Okazis reciprokaj vizitoj de la delegacioj inkluzive de la infanoj (1990, 1993, 1995) Laŭ invito de Hokkajdaj esperantistoj kelkaj membroj de la Esperanto-klubo "Pacifiko" partoprenis la 85-an Japanan kaj 62,64,66 jn Hokkajdajn Esperanto – kongresojn en 1998, 2000 kaj 2002.

La eksprezidanto de Vladivostoka Esperanto – klubo Sergej Anikeev, instruante en Hakodate-filio de For-Orienta Ŝtata Universitato samtempe gvidis E-kursojn por japanoj. Poste grupo de la entuziastoj fondis esperanto-rondeton, kiu ĝemeliĝis kun Vladivostoka Esperanto-klubo en 1998. La Hokkajdaj esperantistoj vizitis en 1999 Vladivostokon, Ĥabarovskon kaj en 2001 Vladivostokon kaj Naĥodkon kaj partoprenis la 3-an kaj 4-an Internaciajn kongresojn de Junaj sciencistoj kaj studentoj, organizitaj de For-Orienta Ŝtata Teknika Universitato, kie Esperanto estas instruata kiel nedeviga studobjekto por studentoj de la 3-a kurso kaj por studentoj de Supera popola lernejo. Estas planita vizito de Japanaj esperantistoj ankaŭ en 2003. Certe, For – Orientaj esperantistoj kontaktas ankaŭ kun esperantistoj de Ĉinio, Koreio kaj aliaj landoj. La Grupo de Vladivostokaj esperantistoj partoprenis en 1992 la 5-an Pacifikan Esperanto – Kongreson en

Qingdao, vizitis Pekinon, Ĥarbinon kaj ties Esperanto-societojn.

Post unu jaro la grupo de ĵurnalistoj de "El Popola Ĉinio" vizitis Vladivostokon, Ĥabarovskon, Moskvon, Sankt-Peterburgon. Pri tiu interesa vojaĝo ili publikigis en sia revuo la grandan artikolon. En 2003 renoviĝis kontaktoj kun esperantistoj de najbaraj provincoj de Ĉinio.

La nuna prezidanto de Vladivostoka E-klubo A. Titajev dum siaj oficvojaĝoj partoprenis la aranĝojn de Korea Esperanto-Asocio kaj Seula Esperanto-kultura Centro. En majo 2001 fama korea Esperantisto, profesoro SO Gilsu oficvojaĝante Vladivostokon ne nur vizitis la lokan klubon, sed dum la oficialaj intertraktoj uzis Esperanton. En 2002 li vizitis per trajno kaj aviadilo multajn urbojn de For-oriento, Siberio kaj Centra regiono de Rusio kaj renkontiĝis tie kun lokaj geesperantistoj.

En 2000 denove estis lanĉita la informbulteno de Asocio de For – orientaj rusiaj esperantistoj sub la nova titolo "La Pacifika Kuriero"; kiu estas dissendata al multaj lokoj de Fora Oriento kaj Orienta Siberio, kaj esterlanden, plejparte al Japanio (Hokkajdo). La Hokkajdaj esperantistoj reciproke sendas sian "Heroldon de HEL".

La estonto de nia granda regiono estas hela kaj alloga. En la sankta afero de firmigo de paco kaj amikeco gravan rolon daŭrigas ludi Internacia Lingvo Esperanto.

Referencoj:

1. Fiŝer A. Historio de Esperanto.
2. Tiflis // Esperanto, 1911, p.10.
2. Справочная книга г. Владивостока.
3. Хабаровск, Изд-во Н.И. Матвеева, 1902, с. 73.
3. Ruslanda Esperantisto, 1907, № 9-10.
4. Enciklopedio de Esperanto. Budapeŝt: HEA, 1979, rol. 1,2. p. 284.
5. Samloke p. 489.
6. Gvidlibro pri Esperanto-movado en Azio. Jokohamo: Mevolibro, 1995, p.87.

Danke ricevitaj (星田津抜い、読みたい方はご連絡ください)

* LA VERDA TERO: Organo de Nord-Orienta Esperanto-Ligo, N-ro 60, Julio 2014: A4X8 頁、日本文。
第 55 回東北エスペラント大会(11 月、盛岡)の案内、加盟地方会(5 団体)の活動報告など。

* Al Vi Kara; N-ro 104, Julio 2014
Kioto-Esperanto-Societo, B5X28 頁のうちエスペラント(E)文 11 頁は来年の関西 E 大会の案内と京都の観光案内など。特別寄稿「中野忠一郎が甦ってくる! / 大類善啓」は昭和初年「京都のザメンホフ」と呼ばれた眼科医中野忠一郎や多くの思い出の人(伊東三郎、阿部祈美その他)のことなど。"Ni vigle agadas En Kioto!" は 2013 年春から 1 年間の京都での活動、訪問外国人等の報告。

* NOVA VOJO: N-ro 509 au~gusto/septembro 2014, EPA(エスペラント普及会)、A5X34 頁のうち E.文 7 頁強。
「Rakontoj el Oomoto/大本物語/Roman Dobrzynski, 和訳: 矢野裕己」は連載 2 回目で終わり。

* La Vulkano; N-ro 173 Au~gusto 2014, La organo de Hukuoka-Esperanto-Societo: B5X8 頁のうち E 文 1 頁。
「八ヶ岳エスペラント館を訪ねて/秋吉任子」、Dum kvar tagoj kun Ges-roj Amisel Kanado(2)/MUTO Tacuko, 「第 100 回日本大会参加報告(2)/萩野明」、「関西大会(姫路)参加記/倉元裕介」、例会報告など。

* La Movado: 関西エスペラント連盟 (KLEG) 発行、N-ro 763 septembro 2014, B5x16 頁のうち E.文 5 頁。巻頭記

事は「簡明日エス辞典ができるまで/タニヒロユキ」。タニさんは 8 月 25 日逝去された。Kajero Libervola/C^irkau~ Esp.-Domo de Jacugatake/ODA Komenco は Esp.-Domo 周辺の案内。「初期のエスペラント運動における『観光』/後藤斉」、吉田正憲さん(熊本)の追悼文 2 通。対訳のページに竹久夢二の「風/Vento/Trad. Oki Keimei」の連載始まる。

* La Suno N-ro 100, 山梨エスペラント会、2014.8.18, B5X32 頁のうち E 文 2 頁半。「山梨エスペラント会機関紙『La Suno』の歩み/工藤尚」は 1950 年 5 月 1 日創刊以来 64 年の歴史。当初の謄写版刷り隔月刊の予定は 1952 年の第 10 号以後長く休刊しその間「はがき通信」が 11 号から 46 号まで号数を継承。1992 年「La Suno」は 47 号からパソコン編集の現在の形で再出発。「季刊」の目標は遅れがちだったが今回 100 号を迎えた。再刊 47 号から 96 号までの内容などが載っている。「ポーランドで出会った人々/引田秋生」はアダムミッケビッチ大学(ポズナン)での第 2 回スクーリングで会った人たちのこと。ALFRED F. MAJEVICZ 教授のところでは 120 年前のアイヌ語の蠟管録音資料も見せてもらった。「世界の Esperantistoj からの葉書/八巻信夫」には美しい切手を張った封書、はがきなどの写真満載。これは郵便の文通でないと思えない。

* Ro^mazi Kenkyu^: 2014 年 9 月 15 日、第 18 号、(公財)日本のローマ字社教育部(NRKK), A4X12 頁のうちローマ字文 4 頁。「Pasupo^to no Ro^mazi/Kimura」はパスポートの氏名表記を訓令式に変更した実例。「その綴りが実際に使われてい

る証拠を持ってこい」とのことである。いろいろ考えたがクレジットカードの氏名表記がそうになっている、との実績一つで解決したとのこと。10月東京で開かれる2014年度ローマ字教育研究会の公開シンポジウムは「日本語表記と漢字の功罪」。

「松本清張『小説東京帝国大学』を読む4/Kimura Itiro[^]」には20世紀初頭の日本史に関する問題:「南北朝正閏論」に関連しての政治家、学者の動き、国語改革、ローマ字運動との関連などが出てくる。北海道からの筆者 Ito[^] Seiti(伊藤静致、もと HEL-ano)は“Uta o wasu-reta kanariya(9)”で日本の歌の紹介を続けている。Otagiri 欄に目黒 E 会の AIBA Mituyasu さんの文がある。

* La Movado: 関西エスペラント連盟 (KLEG) 発行、N-ro 764 oktobro 2014. B5x16 頁のうち E. 文 6 頁弱。巻頭記事は「第 99 回世界 E 大会参加記/浮田政治」。“Internacia Koruso/Akira (Gifu)” と “Kiujn programerojn mi partoprenis en Bonaera UK?/TAHIRA Masako” もブエノスアイレス世界大会について。8月25日、著書「簡明日エス辞典」出版直後に急逝したタニヒロユキさんへの追悼文「タニさんの思想をたどることがタニさんへの恩返し/臼井裕之」。Sun a Loko(哀しみのソレアード)の楽譜が1頁。「サンチャゴ・デ・コンポステーラ巡礼旅/忍岡妙子」が連載開始。この道はユネスコの文化遺産。

Lingvaj babiladoj

HOS[^]IDA Acus[^]i

★「～しないように」

「～するために」は、por ke ... または por —i (por + 動詞不定形: 文全体の主語と、不定形の動詞の行為者が同一の場合) で表します。

(JEI の エスペラント日本語辞典 に出ています)

例: preni plumon por skribi leteron. 手紙を書くためにペンをとる。

では、「～しないように・～しないために」はどうか。

por ke ... (ne を用いる) のほかに、por ne —i で表せます。

ザメンホフの実例がありました。

Fabeloj de Andersen の中にある Neg[^]a Reg[^]ino

(雪の女王、ザメンホフ訳) の第5話の終わり近くに

Jen prenu ancorau[~] du panojn kaj unu s[^]inkon, por ke vi ne bezonu malsati!

——腹が減らないように二つのパンとハムをとりなさい——

がありました。この童話はアニメ劇として NHK が 2005年

長期放映し私も見ていたが このセリフの出る場面が

あったかどうか は 記憶にありません。

★事件

場合によっていくつかの単語が使われます。違いを理解しましょう。

Afero: 事柄、できごと、事件、事業

訴訟事件 にも使われますが この意味では “kazo” も使われます。

探偵小説では “kazo de ~” の形で “~事件” になります。

Incidento: (軽微な、付随的な) 事件、事象、(ささいな) トラブル

Protokolo de la 6-a Komitato Kunsido de HEL/Kasjaro 2014
2014年度 第6回北海道エスプラント連盟委員会 議事録

日時：2014年8月3日（日） 13:00～15:00

場所：札幌エルプラザ2階 会議コーナー

出席者：星田、後藤（義）、山下、後藤（純）、横山、阿部、川合（記録）

〔組織〕

- ・新規加入者：なし。
- ・退会者：なし。
- ・未納者：機関誌に振込用紙同封。
- ・HEL「副委員長」（空席だったが、規約にあり）に後藤純子委員を推薦。

〔財政〕

- ・8月末に会計をいったん締める（阿部）。

〔広報〕

- ・HP：アクセス数70 952件（2ヶ月前より+238）になった（横山）。
- ・HEL掲示板に若干の書き込みがあったが、発展しなかった（横山）。
- ・メールマガジン：6月の発行部数は438部。7月は440部（横山）。

〔教育・研究〕

各地方会の学習、次の通り。

- ・SES：月曜例会で『ロビンソン＝クルーソー』、土曜例会で『華岡青洲の妻』を読んでいる。その他、土曜にはくじ引きで当たったテーマについて話す練習をしている。新人講座は現在、受講生の都合により休み（後藤（義））。
- ・TES：『稲むらの火』、『シグナルとシグナレス』、『めくらぶどうと虹』を読んでいる（星田）。

〔機関誌〕

- ・8月3日、「Heroldo de HEL」第154号、90部印刷・発行。
- ・次号は次回委員会時発行。なお、このとき北海道大会の連盟総会議案書も印刷する。

〔年間計画〕

【北海道大会】10月18日（土）・19日（日）

18日は午後から連盟総会、終了後バンケード。19日の講演は午前中に。

- ・講演講師をアレクサンドラ綿貫氏にお願いしてはどうか（後藤（純））。
- ⇒演題は関西大会と同じ（「現代ポーランド文化に与えた日本文化の影響」）でもよいので、と星田委員長から依頼する。
- ・参加費は1 000円とする。不在参加費の設定はせず、「任意の寄付」とする。

- ・大会記念品は、なし。

【エルプラまつり】9月6日（土）

- ・事前説明会に出席する（横山）。
- ・空クジなしの「くじ」を作り（景品はエスプラント関係の文具等）、JEI三つ折チラシにはさんで配布する（300部作成）。半数くらいはHELの会場に来室してくれるのでは（阿部）。

【地下歩行空間イベント】11月23日（日）

- ・今回の発表形式は「ミニシアター」。映像を流した後、人がナマで出て説明する。川崎エスプラント会等の制作による動画を使うことにする。
- ・申し込みは8月20日より開始。申し込む（横山）。

【合同ザメンホフ祭】（仮）

- ・北海道自由エスプラント協会（LEAH）より、LEAH、北大エスプラント研究会、HELの3者が合同でザメンホフ祭を行ってはどうか、との提案あり（横山）。⇒内容詳細は未定だが、「やる」という方向で今後検討する。

〔次回委員会〕

2014年9月28日（日）。

議案は北海道大会について。

*北海道大会の外国人 gasto と想定した人は大会のころ旅行中とのこと、次の候補としてS-ro Suno の名が挙がったのは9月初め、それから本人と連絡がつき計画の具体化、委員の皆さんほんとうにごくろうさまでした。

*ここ四十年ほど、エスペラントの灯は消えたか、と見えた旭川で9月動きがありました(4頁)。「目の手術の後で今は無理だが いつかお目にかかって話したい」と岡本さんから電話。
Ni laboru kaj esperu!

北海道エスペラント連盟 会費/年

正会員 3000円、 青年会員(26歳未満) 1500円、
購読会員 2000円、 家族会員、失業者など割引 1000円

HOKKAJDA ESPERANTO-LIGO

北海道エスペラント連盟

*Redaktas la Organa Fako de HEL
c^e HOS^IDA Acus^i

*編集:連盟機関誌部

Miyanomori 2-18-18, TOMAKOMAI
053-0844 JAPANIO

〒053-0844 苫小牧市
宮の森町2丁目18-18
星田 淳 方

TEL-FAKS:0144-74-2539

Retadreso:hosidaacusi@kir.biglobe.ne.jp

*Sekretario: KAWAI Yuka

*事務局:川合由香

N-ro 100, Simin-Katud0-Sap0to-Sent0

〒060-0808 札幌市北区

Sapporo L-Plaza 2F, Kita 8 Nisi 3
Kita-ku, Sapporo, 060-0808 Japanio

北8条西3丁目札幌エルプラザ
市民活動サポートセンター レターケースNo. 100

TEL-FAKS: 0126-35-7153

Retadreo: kunespere@olive.plala.or.jp

*TTT-ejo : <http://www.hokkajda-esp-ligo.jp/jp/index/index-j.htm>

*Postg^irkonto (郵便振替) : 02700-6-17075